
# BONA ESPERO



**Cirkulero 55**
**por la amikoj kaj subtenantoj de Bona Espero r.a.**

prezidanto: Otto Nelken,
Hirschfeldstr. 6, DE- 59581 Warstein, ☎+49-(0)2902-57460
retadreso: u. nelken@t-online.de

Warstein, den 13.12.2000

Ankaŭ ĉi-foje Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia havu la unuajn vortojn per sia letero de la 14a de novembro al vi:

*„Karaj geamikoj kaj subtenantoj,*

*Komencis nia printempo, ĉiuj floroj floras, fruktoj abunde maturiĝas, birdoj kantas kaj ŝtelas niajn fruktojn, serpentoj feliĉe malabundas, pluvas kaj pluvegas....*
*Alproksimiĝas la fino de la jaro; la infanoj arde lernas por pasi al la venonta klaso, ĉiuj tre ambicias en siaj hejmaj taksoj; la Kristnaska Festo, la Festo de la Festoj, certe estos la plej grandioza, kiam ĉiuj klopodas imagi la Kristnaskan Paĉjon kun siaj donacoj en grandaj sakoj, kiam la teatraĵoj, kantoj kaj surprizoj regas la mensojn.*
*Kaj ĉio-ĉi en varma suno( kiam ne pluvas!).*
*Sed vi ja volas scii, karaj, kiel ni pasigis la lastajn monatojn.*

***La nacia parko brulis dum kvar tagoj ...** kaj Bona Espero ankaŭ.*
*En la lastaj tagoj de aŭgusto, dum la plej seka sezono de la jaro, nekontrolebla fajro alvenis el la Nacia Parko sur 5 kilometra fronto. Tiu fenomeno ne estas raraĵo, sed ĉijare ĝi estis aparte forta kaj la damaĵoj en la tuta regiono estas gravaj.*
*Niaj 7 km da pikdratbariloj, kiuj brave rezistis dum 15 jaroj, estis 90% forbruligitaj kaj la rekonstruo estos nia prioritata projekto en 2001. Ĉiuj bonesperanoj, etaj kaj plenkreskaj, infanoj, germanaj volontuloj, ĉe ni laborantaj masonistoj, vizitantoj kaj eĉ la helikoptero de la fajrobrigado el Brasilia luktis dum tagoj senhalte por eviti ke eĉ la domoj forbrulus. La helikoptero kaptis akvon el nia lago por giganta pendanta ujo kaj ĵetis flugante la akvon por savi almenaŭ kelkajn fostojn.*
*Certe la tuto estis ekscita aventuro por la infanoj!*

***....sed la brazila armeo helpis nin.***
*Inter la bonaj amikoj de Bona Espero estas kolonelo de la brazila armeo en Brasilia, kiu jam plurfoje vizitis nin kun siaj familianoj. Lastatempe li estis nomumita komandanto de la Prezidenta Gvardio, kiu ne nur pompe paradas dum naciaj festotagoj, sed ankaŭ plenumas sociajn taskojn laŭ la devizo:" Servi la landon signifas ankaŭ helpi tiujn, kiuj plej bezonas". Laŭ tiu spirito kolonelo Paulo Lima sendis al ni en oktobro grandegan militistan kamjonon kun dek soldatoj kaj kompleta kuir- kaj dorm-ekipaĵoj sub la gvidado de talenta serĝento.*
*Dum tuta semajno admire observataj de niaj adoleskoj, la soldatoj farbis,sarkadis, plibonigadis niajn elektrajn kaj hidraŭlikajn instalaĵojn kaj, plej grave, komencis rekonstrui la pikdratbarilojn almenaŭ ĉirkaŭ la domoj. En nian gasto-libron ili skribis: "Ni sentos saŭdadon de ĉi tiu mirinda loko!"*

***"Konkero de la paradizo"***

*La 7-an de septembro Alto Paraiso gastigis elitan grupon de juĝistoj, prokuroroj, advokatoj kaj ĵurnalistoj de nia ŝtato Goiás okaze de oficiala lanĉo de la libro"Rozo de l' Paradizo", kies aŭtoro estas la supera juĝisto Ney Teles . Ĉar jam estas famaj en la regiono niaj artaj prezentaĵoj, oni invitis niajn knabinojn prezenti dum tiu ceremonio klasikan dancon laŭ la melodio de Vangelis el la filmo :"1492 - La Konkero de la Paradizo". La sukceso estis garantiata de la profesia kompetenteco de nia najbarino Myriangela kaj tiel brila, ke la videobendo de la prezento estis en oktobro prezentita sur grandega ekrano dum la lanæo de la libro en Goiânia, nia ĉefurbo.*

***La vizito de doktoro L.C. Zaleski-Zamenhof***

*en aprilo estis la kulmina punkto de nia esperantista aktiveco ĉijare.*
*Verŝajne vi detale legis pri tiu vizito en la gazetaro, vizito kiu mobilizis entuziasme la brazilan esperanto-movadon. Por niaj infanoj, kiuj prezentis al li teatraĵon pri Bialistoko en la deknaŭa jarcento, la vizito de tiu brila kaj amema personeco, restos ĉiam en ilia memoro! Li eĉ naĝis kun la infanoj en nia akvofalo - imagu!!*

***La infanoj***

*Pli malpli diligente ili lernas en la publikaj lernejoj de la urbo kaj vojaĝas ĉiutage do 40 kilometrojn en plenŝtopitaj busetoj. Kiam pluvas, estas vera ĥaoso! Kaj feliĉe ni havas la domon en la urbo, kie ni restas alterne kun duono kelkfoje por ke ili ne tro suferu la vojaĝojn.*
*Ne plu ekzistas analfabetoj en niaj hejmoj, ĉiuj sukcesis lerni la sekretojn de la literoj kaj malkovras paralele la misteron de la matematiko!*
*Ek de kiam ekzistas en nia regiono prokuroroj, juĝisto kaj aliaj utilaj personoj, la telefono ne haltas peti lokon por forlasitaj infanoj. Kaj ni nur povas akcepti la plej suferantajn. Ni iam opiniis, ke per nia laboro la regiono havos malpli da infanoj en riska situacio - iluzio!, la familioj tiel rapide reproduktiĝas en nia senhoma regiono, ke oni povas simple malesperi...*
*Tamen, tamen, Rosamira lecionas, Maria, Ada, Edith, Neuzinha, Amanda ankaŭ; Ursula la bela nigra juna, Andreia kaj Aline jam provinstruas kaj ricevos sian diplomon venontmonate.*
*Tota studas entuziasme en la universitato en Brasilia Administradon kaj laboras en la radiostacio. Renato laboras kaj studas en Formosa, Adão laboras kaj studas en Brasilia kaj ĉiuj iras sian propran vojon.*
*La kvin fratino Daziza, Josefina, Jilza ktp. loĝas apud ni kaj ni havas kiam en la urba domo, daŭrajn kontaktojn kun dekoj kaj dekoj da ekslernantoj.*

***La laborfortoj***

*En septembro alvenis Roberta, tre amema kaj laborema. Ni konatiĝis kun ŝi en julio en Torino: 22jaraĝa, belega, simpatia - la infanoj amas ŝin multe kaj ŝi volas resti ĝis kiam en februaro venos novaj volontuloj el ...Germanio. Intertempe sin anoncis ankaŭ Piotr el Pollando, kiu devas aperi ĉe ni dum la venonta monato.*
*La fondintino Neuza Araujo, jam nun 82jara, alvenos komence de decembro kun kun Moacyr kaj Glorinha, geedza paro de esperantistoj el Recife, kiu jam kelkfoje volontulis ĉe ni kaj volas nun eble resti kelkajn monatojn.*
*Orlando tre harmonie kunlaboras, tre respondece kaj kompetente. Vi ja scias, ke temas pri ekslernanto el la komencaj naŭdekaj jaroj. Li eĉ bone ankoraŭ komunikas en Esperanto kun ni.*
*Krome laboras dumtempe du masonistoj.*
*Ni deziras esprimi al ĉiuj kunlaborantoj de la Subtena Asocio nian grandan kaj koran, sinceran dankon por la financa helpo dum 2000, kiu permesis nutri kaj vivteni ĉiurilate niajn ĝis 30 infanojn.*

*Ni deziras, ke vi daŭrigu pensi pri ni kaj la senfinaj bezonoj en Brazilo.*
*Tre kore, Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia*

'Fino bona – ĉio bona!' oni povus diri konsidere al la enhava sinsekvo en la ĉi-tiu letero. Sed la malmultaj relative nedramecaj frazoj pri la incendio ankaŭ en Bona Espero spegulas la gravajn damaĝojn malpli klare ol kelkaj vortoj de Ursula telefone kaj pluraj fotoj i.a. pri forbruligita marakujo-plantejo.

Kaj kiuj novaĵoj okazis rilate al ĉi-tieaj aktivecoj pri la infanvilaĝo? Ĉe multaj kampanjoj subtenantoj kaj amikoj de Bona Espero kolektis monon kaj plikonigis la projekton: ekz. ĉe popolaj kaj lernejaj festoj, per vendo de memfaritaj saketoj plenaj de kafo kaj kristaloj el la infanvilaĝo same kiel lotoj, per diapozitivaj – aŭ filmprelegoj kaj gazetartikoloj pri Bona Espero. Eble ĉi-tiuj aktivecoj povas esti impulso por kelkaj geamikoj, mem provi similajn kampagnojn. Estus bone, se ni ankaŭ povas informi pri tio en niaj cirkuleroj! – Tiele ni ŝatas danki ĉi-loke anstataŭe por ĉiuj donacintoj, precipe al Mia Böhmer el Krefeld, kiu ekde multaj jaroj nelacigeble kaj sukcesege laboras en plej diversaj manieroj por la bonesperanoj, ekz. ĉe bazaroj kaj per monkolektujo sur stratoj kaj hipodromo.

Karaj amikoj kaj subtenantoj, ĉiuj jaroj denove ni ŝatas bonvenigi ĉi-tie ĉiujn novajn donacintojn tre kore kaj danki al ili pro ilia subteno, sammaniere kiel al ĉiuj ĝisnunaj, el kiuj kelkaj konservas fidelecon al Bona Espero parte jam ekde jardekoj. Ambau grupojn ni korege petas ne malfortiĝi koncerne iliajn klopodojn por la infanoj de Bona Espero.

Al vi ĉiuj mi deziras nome de la tuta estraro

***Ĝojan kristnaskon***
***kaj la plej bonajn dezirojn por la venonta jaro!!***

Otto Wilk



La elŝerpita „fajrobrigado"

**Donaco konto: konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede (BLZ/bankkodo 464 510 12)**
La adreso de la kasistino: Bona Espero e.V., Brigitte Löffler, Zum Loh 9, DE-59909 Bestwig, ☎ +49-(0)2904-6417